



La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia marta kunveno

Dato: Vendredon, la 17-an de marto 2006, 6:30-9:00 pm

Loko: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC

Programo: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – “Komuna Kantado” kun
Jon Liechty kaj Tomaso Morgan.



Oni strebos havi kantan kiel antaŭe,
tamen oni petas tiujn, kiuj havas ŝatatan
Esperantlingvan kanton, ĝin alporti. ★

Protokolo de la kunveno de la 17-a de februaro 2006

Stuart GREEN oficiale malfermis la kunvenon je la 7-a horo. Entute ĉeestis 10 personoj, inkluzive unu gaston, Joe MELE.

Post prezentado de Joe, la protokolo de la januara kunveno estis akceptata.

Sevkis anoncoj. Stuart menciis, ke tiun vesperon okazos spektaklo fare de amiko; li proponis al la ĉeestantoj iri spekti ĝin kun li.

Tomaso ECCARDT anoncis, ke la sekvantan dimanĉon rekomenciĝos la nova Esperanto-kurso, je la sesa vespere en la restoracio Emma's Dilemma sur Park Avenue South. Por pli da informo oni telefonu al Tomaso.

Stuart kaj Tomaso proponis kunvenon de la estraro de la So-


cieto. Oni interkonsentis, ke ĝi okazos la 5-an de marto je tagmezo en IBM Plaza, antaŭ la neformala kunveno tie.

Tomaso petis ideojn pri prelegoj por venontaj kunvenoj. Kiu volus prelegi


pri io en Esperanto dum klubkunveno, tiu bonvolu paroli al Tomaso.

Nijl rimarkis, ke li hazarde renkontis esperanto-parolanton, nomita Daniel HIRSCH, antaŭnelonge dum instruista kunveno en Novjorko.

Du prelegoj sekvis. Unue prelegis Tomaso pri la nanlandoj de Eŭropo, pri kiuj li verkis libron. Li parolis pri la historio, politiko, kaj ekonomioj de la landoj. Scott PAGE



Scott Page parolas pri Moresnet.



Tomaso parolas pri nanlandoj de Eŭropo.

poste prelegis pri la teritorio neŭtrala Moresnet, kiu ekzistis en Eŭropo dum la deknaŭa jarcento.

Je la naŭa, Stuart oficiale fermis la kunvenon. ★

Protokolis: Jeff BLAKESLEE

Venonta vizitos . . .

Kutime vi legas pri gastoj, kiuj vizitis nin en la rubriko 'Laste vizitis . . .' Nun mi volas rompi tiun tradicion kaj informi pri la gasto, kiu venos aprile ĉi-jare kaj prelegos en nia klubo la 21-an de aprilo dum la kunveno. Temas pri la konata en Eŭropo rusa esperantisto Mikaelo Bronŝtejn. Li estas dum lastaj jardekoj unu el la ĉefaj figuroj en rusia E-movado kaj ne nur tio. Dum lastaj UEA-Kongresoj li prelegis pri diversaj temoj, organizis kaj gvidis la



internaciajn koncertojn, prezentis siajn kantojn, versojn kaj librojn. Li estas kantaŭtoro, verkisto kaj preleganto.

Ekde 1993 okazis liaj turneoj en Belgio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanio, Italio, Nederlando, Pollando kaj Svedio, organizitaj de landaj E-asocioj.

Ricevitaj informoj atestas bonan rezulton de ĉiuj turneoj. Li kantis proprajn kantojn kaj/aŭ prelegis pri diversaj temoj por esperantistoj. Nun venis vico de usonaj esperantistoj konatiĝi kun Mikaelo. La unua lia prelego okazos en Novjorko – poste li veturos al Cleveland, Chicago, Washington kaj Baltimore.

Marku hodiaŭ vian kalendaron kaj ne forgesu veni la 21-an de aprilo al la kluba kunveno. Vi ne bedauros! ★

– Sofiya SOSKINA

Klubaj Kunvenoj

Ĉu vi opinias, ke povus esti pli bonaj niaj formalaj kunvenoj ĉe UFT je la tria vendredo de ĉiu monato? Aŭ ĉu estas alia kialo, kiu emigas vin ne ĉeesti? Se vi havas sugeston por la formalaj kunvenoj, bonvolu kontakti min ĉe 212-477-6516 aŭ interrete (mi nomiĝas TECCARDT ĉe HOTMAIL.COM). Volontuloj por fari la majan prelegon estos ankaŭ bonvenaj! ★

– Tom
ECCARDT



IBM Plaza

La 5-an de marto, kvin estraranoj kunvenis je tagmezo por diskuti nian novaĵleteron, *Novjorka Prismo*, kaj niajn klubkunvenojn. Ni ne findiskutis, do ni planas rediskuti ĉe la venonta klubkunveno kaj eble la venonta neformala kunveno.

Poste, venis naŭ pliaj geesperantistoj por ĉeesti nian neformalan kunvenon. Unu el ili estis Francisca de Oliveira Calegari, brazilanino el São Paulo. Ŝi alportis la Esperantajn vortojn de kelkaj brazilaj kantoj. Oni diskutis plurajn aferojn, inkluzive la klu-

Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

Marto 2006

17

ESNY KUNVENO

Komuna Kantado kun
Jon Liechty kaj Tomaso Morgan
Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

Aprilo

2

Tagmanĝo

Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM Plaza
(Limdato por kontribuajoj por Prismo 153)

21

ESNY KUNVENO

Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

United Federation of Teachers (UFT)

50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)

"IBM" Building Atrium

590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium



Francisca de Oliveira Calegari kun Tomoko.

ban programon kaj la venontan ELNA kongreson. ★

– Tom ECCARDT



ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto
Stuart Green
(631) 751-5683

Korespondanta Sekretariino
Rochelle F. Grossman
(718) 457-1490

Protokolisto
Jeff Blakeslee
(718) 383-2715

Vicprezidanto
Nijl Blonstein

Kasistino
Sofiya Soskina
(914) 738-6084

Program-Direktoro
Thomas Eccardt
(212) 477-6516

Novjorka Prismo

Numero 152 – Marto 2006
ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>

Redaktoro
Jim Medrano
(212) 982-5029

Subredaktoroj
Thomas Eccardt
Nancee Medrano

Desegnistino
Mary Pulley

Sendu kontribuojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com

© 2006 Esperanto Society of New York